

Kunmetado de programo

TEJO-seminario: Organizado de sukcesa Esperanto-aranĝo
Junulara E-Semajno 2012

Łukasz Żebrowski

Kunmetado de programo

- Ĉefaj dividoj de programeroj
- Ĝenerala programkadro
- Kolektado de programeroj
- Necesaj informoj pri programeroj
- Kunmetado de programtabulo
- Tipaj celgrupoj
- Praktika tasko

Ĉefaj dividoj de programeroj

Divido laŭ loko en la tago

- taga programo
 - movadaj
 - temaj
 - distraj
- vespera programo
 - koncertoj
 - spektakloj
 - kvizoj
- Divido laŭ speco de programero
 - prelegoj, prezentadoj
 - diskutoj, debatoj
 - kunsidoj, kunvenoj
 - seminarioj
 - ekskursoj
 - aktivajoj

Ne ĉiam klaras kiuj programeroj apartenas al temaj kaj distraj. Temaj estas tiuj ligitaj kun specifa temo de la evento, se tiu ekzistas (ekzemple „Liberec’’), dum temaj estas manlaboroj, danckursoj, lingvokursoj ktp.

Ĝenerala programkadro

- manĝoj
 - ĉu du aŭ tri
- kernaj programeroj
 - kulturlingvaj aŭ kulinaraj festivaloj
 - aparte gravaj prelegoj ktp.
 - silvestra balo
 - asembleoj
 - aliaj depende de aranĝo

Aliaj depende de aranĝo: ekzemple akvobatalo en IJS

Kolektado de programeroj

- aliĝilo
- proponado kaj personaj kontaktoj
- mem kreaĵaj programeroj
- sperto de la teamo

Aliĝilo: de tie venas ĉefe distraj programeroj, movadaj kaj temaj kutime malmultas, krome foje la enskriboj estas tre enigmaj.

Memfareblaj estas laŭ ekzemplo de ĉi-JES: movadaj debatoj, „Prezentu Vian aranĝon”
Sperto de la teamo, do demandoj al la antaŭaj organizantoj, plej bone kompletigita per informstokejo (ekzemple vikio) [ĉi tie en la prelego estas prezentita vikio de JES].

Necesaj informoj pri programeroj

- titolo
- preleganto(j)
- bildo
- daŭro
 - unufojaj
 - plursesiaj
 - regulaj
- bezonataĵoj
 - speco de ĉambro
 - projekciilo
 - komputilo
 - tabuloj paperaj/blankaj (kaj konvenaj skribiloj)
- partoprentempo kaj ekskursemo de preleganto

Bildoj gravas por kongresa libro, eventuale ankaŭ por programtabulo.

Kunmetado de programtabulo

- unuavice kernaj kaj nmoveblaj programeroj
- duavice regulaj kaj plursesiaj programeroj
- triavice programeroj de kontribuantoj, kiuj havos plurajn programerojn
- poste ĉiuj ceteraj
- ne povas samtempi programeroj kiuj bezonas iujn tre limigitajn ilojn, ejojn ktp.
- programeroj kun la sama celgrupo ne okazu samtempe
- regulaj programeroj laŭeble okazu je la sama horo en ĉiuj tagoj

Manieroj estas diversaj depende de prefero de faranto kaj ankaŭ de momento de farado. Eblas ekzemple fari tion: papere, en word, en excel, en googla kalendaro ktp. [ĉi tie en la prelego estas prezentataj ekzemploj de tiuj diversaj manieroj].

Tipaj celgrupoj

- movademuloj, aktivemuloj
- novuloj
- lingvemuloj
- manlaboremuloj
- vojaĝemuloj
- aliaj depende de evento

Programeroj por malsamaj celgrupoj laŭeble ne okazu samtempe. Tio tamen ne signifas, ke ĉiam devas esti io por ĉiu grupo – ja ĉiu partoprenanto apartenas al kelkaj malsamaj grupoj. Kiam oni preparas programtabulon papere, tre facilas kontroli tion markante celgrupojn per koloroj.

Gravas ankaŭ...

- bone komuniki kun kontribuantoj
- danki al kontribuantoj en taŭga maniero
- kolektadi ĉiujn informojn en ordigita maniero
- efike informadi al partoprenantoj (komprenebla programtabulo, anoncado...)
- konsultadi kun aliaj teamanoj
- ne akcepti ne teaŭgajn aŭ ne valorajn programerojn

Komuniki kun kontribuantoj ne nur antaŭ la evento, sed ankaŭ dum ĝi – ekzemple informante pri eventualaj ŝuoj de iliaj programeroj, pri forgesitaj bezonataĵoj ktp. „Taŭga maniero” danki al kontribuantoj estas dependa de la aranĝo kaj ankaŭ de ĝia buĝeto, ĉar unu el la manieroj estas danki finance per eta rabato. Por kolektadi informojn en ordigita maniero tre taŭgas vikio [ĉi tie en la prelego estas prezentata ekzemplo de JES-vikio]. [En la prelego prezentatas diversaj ekzemploj de programtabuloj]. Konsultado kun aliaj teamanoj – ekzemplo de IJK 2005, Zakopane, kie koncerto de Krio de Morto, feliĉe ne estis planita por la ekskursita tago, kiam estis ekskurso al Auschwitz, ĝuste dank al konsultado kun respondeculo pri vespera programo.

Tasko: kunmetu programon

- 5-taga aranĝo en somero (merkredo-dimanĉo)
- Antaŭvidata por ĉ. 200 homoj
- Unu el la tagoj devas estu ekskursita tago (sen alia programo)
- Haveblas 3 salonoj (2 grandaj kaj 1 malgranda)
- Haveblas 2 projekciiloj

Aranĝo por ĉ. 200 homoj signifas, ke estu ĉ. 3 samtempaj programeroj, ĉar ĉirkaŭ duono de partoprenantoj partoprenas tagan programon.

En ĉiu el la salonoj estas konvenaj tabuloj ktp.

Ne zorgu pri vesperoj, nek pri ekskursoj.

Prefere estu unuhoraj programunuoj.

Ne zorgu pri alvenoj kaj foriroj, ni supozu, ke tiuj okazas vesperon de la antaŭaranĝa tago kaj matenon de la posaranĝa.

La alkrōĉita tabelo estas programPROponoj. Vi ne devas akcepti ĉion, ĉar la programo estas Via verko pri kiu Vi respondecas.

La tasko preparita por teamoj de 2-3-personoj finenda ene de 40-minutoj.

La taskon sekvas intergrupa diskuto de la rezultoj: rimarkigado de alfrontitaj malfacilaĵoj, taksado de alies programtabuloj.